

**Eldonantaro:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gilli Norda, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonia)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

**Administrado:**  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtekonto Köln 7066, por Teo Jung, Horrem.

**Redaktoro:**  
Ĉefredaktoro: Teo Jung.  
Kunredaktoroj: J. Fethke, H. Hurler, Max Buttin.  
Literatura red.: Zanoni.

**Kunlaborantoj**  
inter la Esperantistoj de la tuta mondo.

# ESPERANTO

## TRIUMFANTA

Multaj abonoj akceptitaj por

**fiksita tempo**

finigas per la lena numero. Oni re-abonu tuj

**sed nur por certa nombro**

de numeroj.

**Semajna**

**Kun senpaga monata „Revuo“**

**Neŭtrala**

Abonon ni akceptas ne por fiksa tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. Germanoj abonu ĉe sia poŝtoŝeĉejo.

**La prezo de unu numero estas por la landoj:**

Aŭstra 800 Kr.	Ĉeĥoslov. 1.20 Kr.	Hungara 30 Kr.	Litova 20 Cđ	Rumana 3 Leol.
Belga 0.60 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.70 Lit.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 40 Gmk.
Bria 5/4 Pe.	Francja 0.50 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levov	Germana 120 Mk.	Jugosl. 1.60 Din.	Pola 150 Mk.	Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.30 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.50 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj latvoj demando la prezon ĉe sia Abonelo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 stampilan Respond-Kuponon.

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4. Por Adresŝanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm<sup>2</sup> 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 60 gmk.); rabato laŭ interkonsento.

**Numero 117 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 31. Decembro 1922.**

**A**PLUD haveno mi staras. Ŝipo ĵus envenas de l' vasta maro. Bonon kaj malbonon ĝi spertis dum longa vojaĝo. Belajn, trankvilajn, sunplenajn tagojn kaj pacajn, lunbrilajn noktojn ĝi travivis. Sed ofte la ĉielo, nigra pro nuboj, pendis super ĝi plumbopeze kaj subite uraganoj ekestis, vips la ondegojn de l' oceano, ke bruanie kaj bojante ili lekis la vaĝojn de l' ŝipo, sprucis fontanojn trans ĝian ferdekon, levis alten al la nuboj la malfortan verkon de homa mano kaj jetis ĝin profunden en abismon. Kaj fulmoj ekflamis, fondaĵoj murmuris, muĝegis tuta infero da mal-katenitaj elementoj. Tiam la ŝipon minacis danĝero kaj perejo. Tiam ĝi krakegis de kapo ĝis vosto, de fundo ĝis supro, kvazaŭ ĝi displitiĝos. Sed brava direktillisto estis sur sia posteno, brava kapitano dantis saĝajn komandojn, bravaj ŝipanoj serioze plenumis sian devon. Kaj fine la ŝipo, tra tempesto kaj teruro, tra nigro kaj nokto, feliĉe atingis la havenon.

Alia ŝipo ĵus preligas siajn velojn por forlasi la havenon. Nun ĝi preternavigas la venantan ŝipon, por — same kiel tiu — venki la ondojn de l' oceano kaj, se necese, spiti minacon kaj danĝeron, reĵeti atakojn kaj ĉiusepacajn malamikaĵojn de furiozaj elementoj.

Kaj nun mi ankaŭ ekkonas la surskribojn sur la ventro de ambaŭ marvenkuloj: unu portas la cifernomon 1922 kaj la alia nomigas 1923.

La malnova jaro — ŝipo 1922 — ĵus plenumis sian kuradon. Mi altras ĝian bordon. Tie mi trovas valoran ŝarĝaĵon: mil kaj mil tabuloj kaj tabuletoj kuŝas en la interno de l' vasta ŝipventro.

Du tabulojn mi prenas, kiuj plej multe min interesas: unu kun surskribo „Esperanto“ kaj alian kun surskribo „ET“. Jen mi trovas entĉizitaj kaj bele orditaj laŭ kronologia sinsekvo la sukcesojn kaj malsukcesojn de nia movado dum la pasinta jaro.

El la multenombraj sukcesoj mi recitu nur la plej gravajn: Internacia Konferenco en Genève pri Instruado de Esperanto en Lernejoj; XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko; la diversaj naciaj Esp. Kongresoj; la fina koncentriĝo de ĉiuj organizitaj Esperantistoj en unu oficiala Esperantista organizo, estrata de Centra Esp. Komitato; kaj la traktadoj pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. Parolante pri malsukcesoj, mi devas diri, ke ili ĉefe nur relative estas mal-

sukcesoj, t.e. ke ni eble atendis ankoraŭ pli grandajn sukcesojn ol la atingitajn; laŭ tia vidpunkto nia tuta movado konsistis nur el unu sola daŭra sukceso aŭ daŭra malsukceso, laŭ la mezuro, kiun oni aplikus. Sed tia vidpunkto estus artifika.

La sama validas pri ET. Mi esperis akiri mil novajn abonantojn en la jaro 1922, sed mi akiris nur la duonon. Ĉu do paroli pri malsukceso, ĉar la progreso atingita estas malpli granda ol la esperita? Ne, neniel! Pro si jam estas atentinda sukceso, ke ET povis daŭrigi en la ĵus pasinta jaro, eĉ en sama amplekso kaj arango kiel komencite en oktobro 1921, sian nepre regulan, ĉiusemajnan aperadon. Tri numeroj: speciala numero pri la Jubilea Ekspozicio en Rio de Janeiro, nia 100-a jubilea numero (nur malmultaj Esp. gazetoj atingas 100 numerojn), kaj nia Nürnberg-numero, eĉ aperis en eksterordinare granda eldonnombro kaj estis ses-paĝaj, la du lastaj estis dukoloraj presitaj. Komence de novembro ĉiu abonanto de ET ricevas senpagaĉe ĉiusemajnan Revuon. Cetere, ET per sia nekutima fidindeco kaj reguleco nun tute firme radikas en la Esp. movado, ke sen ET ĝi jam apenaŭ estas imagebla.

Krom la morala sukceso per ET ni atingis ankaŭ belan materialan. Ni povis konstrui propran presejan konstruaĵon kaj pligrandigi nian provizon je preslito. Kvankam nia presejo okupas sin ankaŭ per ne-Esperantaj presadoj kaj ĵurnalo, tamen la profito el ET konsiderinde akcelis la materialan plibonigon de nia entrepreno. Ĝis nun estis ja preskaŭ miraklo, entute iom profiti per eldonado de Esp. gazeto. Sed en tiu ĉi jaro prudenta uziĝo de la eksterordaj valutaj cirkonstancoj ege plifaciligis nian verkon. Tiu tute stranga kaj ĝenerale nepre malbeninda, kvankam por ni favora situacio certe baldaŭ ĉesos, kaj jam nun mi zorge pripensas la rimedojn, kiuj garantias al ET ankaŭ estonte sekuran ekzistadon. La samideanoj povas esti tute trankvilaj pri la estonta sorto de ET. Jam sufiĉe multaj personoj dependas de ET, por ke mi ne agu senpripense: mi mem, parte mia frato kaj miaj gepatroj, la administristoj, la helpredaktoro, la ekspedistino, tri kompostistoj, unu presisto kaj du helpistinoj. Tiu nombro supoze ankoraŭ pligrandiĝos en venonta jaro, kiam mi povos efektiviĝi miajn novajn projektojn.

Kompreneble, por la daŭra sukcesigo de ET mi bezonas la plenan konfidon de la abonantoj, en estonteco ankoraŭ pli ol ĝis nun. Sed tio jam staras, kiam ĝi revenos, sur la tabuloj de la dua ŝipo, ĵus forlasanta la havenon. Nun ili

estas ankoraŭ malplenaj. Sed kelkajn surskribojn ni jam povas diveni. Por ET: la kunfando de „Internacia Komerca Revuo“ kun ET por koncentrigi la fortojn; por Esperanto: Internacia Komerca Konferenco en Venezia, sendube de speciala signifo, kaj XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg, kiu promesas fariĝi pli multnombra vizitata ol ĉiuj ĝisnunaj Esp. kongresoj.

Velu, kara ŝipo, velu! Kuraĝe antaŭen tra ondoj kaj oceanoj! Ne timu! Post unu jaro ni revidos vin!

T. J.

### Al la aŭstruja Esperantistaro!

En la tuta Esperantistaro de Aŭstrujo ĉiam pli enradikiĝas la konvinko, ke la ĝis nun tie ĉi faritaj poresperantaj klopodoj kaj la jam atingitaj sukcesoj ne estas ankoraŭ sufiĉe inter la publikaj amasoj kaj speciale ne en oficialaj, registaraj randoj, nur pro tiu kaŭzo, ĉar la Esperantistaro de tiu ĉi ŝtato ne kapablis ankoraŭ starigi sur neŭtrala, komuna kaj nepolitika platformo.

Tute ne sufiĉas esti organizitaj en fakaj grupoj aŭ eĉ disigitaj laŭ partiaj vidpunktoj, kiuj ne koncernas la pure lingvan kaj propagandan demandon de Esperanto.

Disbatita agado malfortigas la rezultojn, dum ni deziras, ke ĝi konvinku la popolamasojn pri la alta interna valoro de nia komuna celado.

La ebleco unuigi ĉiujn aŭstrajn Esperantistojn en unu centra ligo, — subordiganta la al ĝi atingitajn grupojn kaj societojn, — por la jam nomita apartiĝemo de aŭstraj Esperantistoj laŭ fakoj aŭ partioj ne ekzistas. Tial ni nun celas krei reprezentantaron sur plej larĝa, demokratia fundamento, meritontan la nomon de vere aŭstruja Esperanto-parlamento.

La subskribitaj randoj, societoj aŭ unuigoj de Esperantistoj en Wien decidis per siaj delegitoj, en plena interkonsento kun aliaj Esp. organizacioj, speciale niaj amikoj en Graz: Stiria Esp. Societo, kaj Salzburg: Salzburga Esp. Grupo, inviti por fondo de la dezirata tutaŭstruja parlamenta Esperanto-tribuno: Aŭstruja Esperanto-Delegitaro.

La Esperantaj societoj en Wien dum pli ol du jaroj elprovis en la praktiko la taŭgecon de ĉi tiu sistemo, kunigi randojn kaj precipe iliajn fortojn, alimaniere ne kunigeblajn, per rajtigita delegitaro. Pli kaj pli oni akiris la certecon, ke la

delegitaro sistemo solvas la problemon: konservi memstarecon kaj krei komunecon samtempe.

Sabate la 6-an de Januaro 1923-a okazos en Wien la decidanta konferenco de la aŭstrujaj Esperanto-grupdelegitoj.

La tuta programo de la konferenco estas sendata al ĉiu, kiu postulas ĝin de la Esp. informejo en Wien.

La subskribitaj Esperanto-societoj de Wien kore invitas ĉiujn samideanojn, ke ili estu kunfondantoj de tiu ĉi por Esperanto en Aŭstrujo plej grava organizo. Ili trovos ĉe ni vere amikan akcepton.

Ni do alvokas vin, samideanoj el ĉiuj lokoj de nia lander-ligo al komuna kaj fruktodona kunlaboro!

Wien, decembro 1922-a.

La delegitoj de: Aŭstra Katolika Ligo Esperantista. — Bohema Klubo Esperantista. — Eldona Societo Nova Tempo. — Esp. Lab. Unuigo „Fratico“. — Esp. Soc. „Jan Amos Komensky“. — Esp. Gr. de Komercoj. — Esp. Laboristaro Kristana de Aŭstrio. — Esp. Rondo de Blinduloj. — Esp.-Rondo Junularo. — Esp.-Soc. „Danubio“. — Esp.-Tablo „Verda Stelo“. — Esp.-Unuigo „Fideleco“. — Esp.-Unuigo „Mondpaco“. — Esp.-Unuigo Unua de Wien. — Instr. Unuigo Esp. — Kanto-Soc. Zamenhof. — Kat. Unuigo Esp. — Kooperativo Eldona de Esp. Universitato Popola. — Libereco, Hungara Esp.-Societo. — Polica Esp.-Unuigo. — Tramvojtista Unuigo Esp. — UEA-Delegitoj.“

Sabate, la 6-an de Januaro: Prepara kunsido kaj fondanta ĉefkunveno.

Dimanĉe, la 7-an de Januaro: Daŭrigo de la fondanta kunveno.

Ĉiu Esperantisto estas petata akceli la projekton. Oni tre urĝe preparolu la programon en societoj, randoj ktp., ankaŭ en Esp. kursoj. Oni elektu ĉie kaj tuj la rajtigotajn delegitojn. La prepara komitato en Wien tre baldaŭ sendos ankoraŭ sciiĝojn, espereble agrablajn por vojaĝemaj samideanoj.

Demandojn, anoncojn ĉiusepacajn, la Esperantistaro direktu al: Esperantista Informejo Nova Tempo, Wien, VI., Mollardgasse 55.

### La trompema lifto

aŭ: la malico de l' objektoj.

Kara sinjoro redaktoro!

Ĉu ekzistas ankaŭ liftoj en via urbo? Kompreneble? Ĉu vi ofte tian uzas? Jes?

Kara sinjoro! Estu singarda, mi avertas vin. Sciante, ke vi estas iomete facilanima kaj malpripensa, mi ne opinias, ke vi konscias pri la tuta danĝereco kaj maliceco de certaj objektoj, kiuj ĉiam, kiam ajn ili povas, penas venĝi sin je ni homoj pro tio, ke ni, kiel la pli inteligentaj estajoj, uzas iliajn servojn. Al ĉi tiuj malicegaj objektoj apartenas antaŭ ĉio la liftoj.

Pro kio vi ridas, sinjoro? Vi ne kredas? Se vi sciis, kion mi scias, se vi estus havinta ĉi tiurilate la samajn spertojn, vi ne tiel kapskuante murmurus: „Kion volas diri la stultulo?“

Sed mi ja voletas evitiĝi al vi tiajn malagrablojn, ĉar vi estas mia amiko. Sed klinu vian kapon tute proksime al la letero — ankoraŭ iomete pli proksime — jen, tio sufiĉas! — legu nepre tute mallalte — domaĝe, ke oni ne povas flustril sur la papero aŭ almenaŭ mallalte skribi sur ĝin. Ĉar la afero, kiam ni rakontas al vi, estas ne tre gloriorica por mi; ne al ĉiu ajn mi rakontus ĝin — sed nur al miaj plej intimaj amikoj por averti ilin. Tial mi plej sincere konsilas al vi: nepre evitu la ruzegeajn liftojn, uzu ilin plejeble malofte, nur tiam, kiam alia farado ne estas ebla.

Estante ankoraŭ infano mi same kiel vi treege ŝafis karuselojn, precipe la tiel nomatajn rusajn balancilojn. Legu ĝuste: „rusajn“ mi skribis; ĉu ili ankaŭ povas fariĝi „ruzaĵ“, mi ĝis nun ne eksciis.

„Same kiel mi?“ vi eble demandos.

„Jes, jes, sinjoro, same kiel vi, ĉar alie vi ne tiel ofte uzus liftojn, ĉu ne?“

Kiam miaj gefratoj kaj kamaradoj dum la popol-festo elspezis sian monon duone por aĉeti sukeraĵojn kaj nur duone por veturi karusele, mi havigis la mian ekskluzive al la diversaj karuselistoj. De ĉi tiu pasio mi eĉ ĝis nuntempe ne povis liberigi min. En la ekleziaj benfestoj, fojroj, pafistfestoj kaj kromaj festlokoj, kiujn mi kun preferemo vizitas en la tuta atingebla ĉirkaŭaĵo, mi ŝatas dum horoj ĉestari ĉe tiaj plezurkazoj rigardante la feliĉajn infanojn kun sopirplenaĵoj okuloj. Tremetas kaj jukas miaj fingropintoj kaj piedfingroj por partopreni, sed tio bedaŭrinde ja ne konvenas al serioza viro. Tion diris almenaŭ mia kara edzino, kiam mi foje riskis elparoli tian deziron. Ne helpis la rimarkigo: „Sed tie ja estas skribite: Plenkreskuloj pagas 10 pfenigojn, infanoj la duonon, do ankaŭ plenkreskuloj povas veturadi.“ „Stultulo“, ŝi respondis, „de vi oni certe postulus nur la pagon por infano.“

Kion vi opinias pri ĉi tiu afero, kara sinjoro? Ĉu ne estas bona kaj ŝatinda karaktereco, ke mi konservis al mi mian infanan animon? Sed al mia edzino tio ne klariĝos. Ĉu vi entute jam renkontis virinon, al kiu io klariĝis? Certe ne. Certe, kiam ni ankoraŭ estis geflanĉoj, tio estis alia afero: tiam ŝi tute ne kontraŭis ree kaj ree veturadi kun mi, kaj kiam mian buŝon ŝi ameme flustris: „kune ni balanciĝu tra la vivo, amata Kristiano“. Sed nun la afero aliĝis kiel ja ĉio aliĝas post la edziĝo. Tamen mi kelkfoje sukcesas kontentigi mian pasion; mi kunbalanciĝas kun miaj infanoj, pretekstante, ke tio estas nur pro antaŭzorgo, por eviti elfaladon de l' etuloj.

„Sed nur unu fojon“, diras tiuokaze mia edzino „Sekrete mi donas trinkmonon al la karuselisto, por ke la veturado daŭru plejeble longe.“

Nu, por ĉio ja ekzistas anstataŭilo, eĉ por la karuseloj; tian mi trovas plej oportune en... la liftoj. Ho, estas nepriskribebla sento, kio rampas al nia koro, kiam la lifto ekmoviĝas supren, kiu eĉ pli tralukas la tutan korpon, se oni ekveturas malsupren. Feliĉe ekzistas multaj liftoj en nia urbo; en la plej multaj magazenejoj troviĝas tiaj. Preterirante kun mia edzino magazenojn, en kiu mi scias lifton, mi tufole instigas ŝin — eĉ senbezone — aĉeti ion en la plej supraj etaĝoj, kien ni kompreneble veturas per la lifto — aliajn magazenojn mi neniam eniras. Dum mia edzino elektas la aĉetotaĵojn — kaj tio plej ofte daŭras sufiĉe longe — mi forŝteliras en favora momento por ekhavi mian specialan plezuron. Mi veturas per la lifto supren kaj malsupren, malsupren kaj supren, ĝis kiam mi supozas, ke la aĉeto estas finita. Kompreneble mi ne povas eviti, ke mia edzino rimarkas mian foreston kaj elparolas ĉi tiurilate demandon: „Pardonu“, mi flustras al ŝi, „mi ĵus havis etan bezonon.“

Ĝis antaŭ nelonge ŝi tute ne havis suspekton, kvankam ŝi kelkfoje rimarkigis:

„Estas strange, ke vi prokrastas viajn etajn bezonojn ĝis kiam ni estas en iu magazeno.“ Sed iutage ŝi surprizis min; neatendite ŝia aĉeto estis tre rapide finita, kaj ŝi longtempe observadis mian senĉesan liftveturadon. Kiam mi eliris, ŝi staris kun severa mieno antaŭ mi. Kvankam ŝi diris nenion, mi legis en ŝia vizaĝo, ke ŝi ĉion scias.

„Jen“, mi provis defendi min, „tio estis ja sendanĝera plezuro kaj ĝi kostis nenion.“

Sed senvorte ŝi iris kun mi hejmen. Kaj hejme la bombo eksplodis... vi pensas, ĉu ne? Ne, sinjoro, la afero finiĝis neatendite

oportune. Eŭlialio demetis zorge sian ĉapelon, turnis kun teatra pozo siajn okulojn al la ĉielo, t.e. al la plafono de l' ĉambro, kunbatis siajn manojn super sia kapo kaj ekploregis kriegante: „Bona Disinjoro, infanon vi donis al mi kiel edzon, kun infano mi estas edzinigita.“ Poste ŝi svenante falis sur seĝon.

Depost tiu tago mi ne plu havis okazon liftveturadi, ĉar en magazenojn mia edzino ne plu kunirigas min, mi devas ekstere atendi ŝian revenon; sekrete eniri, tion mi ne riskas.

Sed plej tragediana liftafero mi travivis antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi vizitis kune kun mia edzino miajn parencojn en la ĉefurbo de nia lando.

lumatena mia bofrato invitis min fari kun li promenadon tra la urbejo. Preterirante kolosan konstruaĵon li retenis min. „Atendu momenton“, li diris, „mi devas ordigi ion en ĉi tiu oficejo, ne daŭros longe, — aŭ pli bone, iru kun mi kaj atendu en la antaŭhalo.“

Mi iris kun li. Sed apenaŭ enirante, mi eklaŭtigis krion, krion pro surprizo kaj ĝojo, ĉar mi ekvidis ion, sinjoro, mi vidis ion, kio ekŝaltigis mian koron en mia brusto.

„Kio estas tiel interesa ĉi tie, kara bofrato?“, demandis mia parenco.

„Diru, Karlo, ĉu tio ne estas... ho, mi preskaŭ ne riskis elparoli la vorton, tiel mi timis seniluziĝon... ĉu tio ne estas...“

„Lifto“, li rediris, „kompreneble lifto.“

„Lifto“, mi kun sopirekĝemo ripetis, „lifto. Sed, mi laŭte daŭrigis, „liftojn mi jam ofte vidis, sed ankoraŭ ne tian.“

„Tion mi kredas... en via vilaĝo...“

„Ho, permesu, ... vilaĝo... kun pli ol 100000 enloĝantoj!“

„Nu, vi ja havos plej oportunan okazon por admiri ĉi tiun vidindaĵon. Do ĝis revido!“

# Esperanto kaj la ŝtata sekretario D-ro Becker.

Altaj vizitantoj estis en niaj Breslaŭaj lernejoj la lastajn tagojn de novembro. La ŝtata sekretario D-ro Becker vizitis la 28-an la universitaton kaj la teknikajn altlernejojn. La 30-an li ĉeestis al la instruado en la »reformlernejo« (katolika popollernejo n-o XLII) kaj en la Bender-supera-reallernejo. Ankaŭ mia klaso, la unua klaso de la urba katolika duagrada lernejo por knaboj n-o II, havis la honoron de la vizito de D-ro B., kiu venis speciale por aŭdi Esperanto-lecionon. Ĉar — laŭ lia diro — li interesiĝis multe pri nia lingvo, kaj li volis nun vidi kaj aŭdi ĝin en la uzado de la ĉiutaga vivo.

S-o B. estis akompanata de ministra konsilano D-ro Wende kaj de fak-direktanto Müller el Berlino, de prezidanto de la provinca lernejo kolegaro D-ro Schauenburg kaj de sekreta konsilisto D-ro Jantzen, de registara konsilisto D-ro Bürger, de urba lerneja konsilisto D-ro Lauterbach kaj de super-reallerneja direktoro D-ro Fox.

Miaj lernantoj, la helpantoj de nia XI-a germana kongreso, tre bone komprenis la gravecon de la momento por nia movado kaj estis korpe kaj anime ĉe la afero. Vigla interparolado de 20 minutoj kondukis ilin tra la diversaj flankoj de la ĉiutaga vivo. Mi mem parolis nur Esperantlingve. Por ke nia aŭskultantaro povu sekvi la fadenon de la instruado, unu el la lernantoj tradukis mian demandon senhezito germanlingve, alia respondis en Esperanto, kaj la tria donis ĝian germanan tradukon.

Fine s-o B. esprimis malkaŝe sian grandan kontentecon pri la aŭdita leclono, kaj ankaŭ la aliaj gratulis min je la sukceso.

Nun mi kredis alveninta la momenton por fari Esperanto-semadon en la bone preparitan kampon, kaj mi diris al mia vizitanto: „Altestimataj s-oj, se vere tiu ĉi Esperanto-leclono plaĉis al vi, tiam mi havas unu grandan peton... Havu la bonecon fari vi mem la el ĝi rezultantajn konkludojn!... Mi mem estas maljuna mondlingvano. Kiam en la jaro 1887 mi alvenis Breslacion, volis la hazardo, ke mi venis al lernejo, kies rektoro estis ĉefo de la Volapükistoj. Li salutis min okaze de mia oficiala vizito per la vortoj: »S-o D., vi ankaŭ fariĝos Volapükisto, ĉu ne?«... Kaj efektive mi sekvis kun 30 aliaj gekolegoj kurson de mia ĉefo, verkis artikolojn por lia gazeto kaj ricevis post unu jaro de la mano de s-o Schleyer la diplomon de Volapük-instruisto. Venis la tempo de malkonkordo. Ĉiu ĉefulo volis esti papo, kaj ĉiu reformis laŭ sia bonplaĉo. Tiam mi forlasis kun granda bedaŭro la perditan mondlingvon kaj studadis fervore la francan kaj la anglan lingvojn, al kiuj mi dankas multajn belajn horojn en la studad-kambro, dum vojaĝado en la klaso kaj en fremdlingvaj rondoj. Sed neniam forlasis min la sopiro je la mondlingvo, ĉar ĉiam mi diris al mi, ke krom germanoj, francoj kaj angloj vivas ankoraŭ multe da aliaj popoloj en la mondo, kiuj ĉiuj donis iliajn donacojn al la homa kulturo. Kiam do mi legis antaŭ 8 jaroj en mia gazeto, ke la nova mondlingvo Esperanto faris ankaŭ en Breslaŭ grandajn progresojn, mi aĉetis Esp. lernolibron kaj vidis kun entuziasmo, ke Esperanto realigis mian revon pri ideala mondhelpingvo. Depost tiu ĉi tempo mi estas fervora Esperantisto, plene konvinkita, ke Esperanto venkos kaj ke estas nepre necese enkonduki ĝin en ĉiujn niajn lernejojn.“

Ĉu mia semado portos fruktojn? — Ni esperu!

# Kiel Nürnberg fariĝis kongresurbo.

De Lorenz Meyer.

Kiel libroj, tiel ankaŭ kongresoj kaj nelaste niaj universaliaj kongresoj havas siajn sortojn. Tiurilate estus certe tre interese ekscii, kiaj cirkonstancoj decidigis de kazo al kazo la elekton de niaj ĝisnunaj 14 kongresurboj, kiuj malhelpaj devis esti superigitaj, kiuj vidpunktoj devis esti respektataj por trovi taŭgajn kongresejojn, kiom eble ankaŭ embaraso, hazardo kaj sentimentoj ludis en tio sufiĉe gravan rolon.

Ĉiokaze la elekto de Nürnberg ne trovis la tian Esperantistaron nepreparita. Pasis ja nun preskaŭ plena jaro, de kiam en la Nürnberg-Fürth Esperanto-gruparo ekaperis la unuan fojon tiu penso kaj trovis de nun ĉiam kreskantajn interesojn kaj fervoron. Okazis je komenco de oktobro 1921, kiam nia meritplena prezidanto Prof. D-ro Ledermann, raportante pri la pasinta Praha kongreso, impulse ekprenis la demandon, kial do la belega Nürnberg, la historia Esperanto-centro, ĝis nun ne vidis Universalan Kongreson en siaj muroj, kaj sekve de tio faris la proponon ekamikigi foje kun tiu ĉi penso kaj inviti eble la tutmondan Esperantistaron por 1923. La sugestoj trovis entuziasman ekanon, kaj kvankam la ĉeestantaro ne tuj definitive decidigis ĉi tiun vesperon pri la afero, oni tamen komisiis kelkajn estraranojn, ke ili verku specialan memorskribaĵon por prezenti ĝin en la venonta ĉefkun-sido.

Jam la 11-an de novembro nia kartelestro detale pritraktis la diversajn argumentojn, kiuj nepre pledas, laŭ li, por germana kaj speciala Nürnberg-a kongreso. Li diris, por ebligi la partoprenon je U. K. al kiel eble plej multaj samideanoj, U. K. povas okazi en la venontaj jaroj nur en malbonvaluta lando. La orientajn landojn oni jam favoris per la Praha kongreso, la nordajn landojn 1922 per la elekto de Helsinki; nun la vico estas ĉe mezŭropaj landoj. Aŭstrujo, Hungarujo, Polujo kaj Danzig, pro la diritaj kaŭzoj, krome por staj necertaj politikaj cirkonstancoj, apenaŭ estas konsidereblaj; kontraŭ tio Germanujo ŝajnas tute taŭga por 1923. Post la ne tre bone vizitita Helsinki-a kongreso ni bezonas, jam pro propagandaj kaŭzoj, refoje imponan kongreson, kiu evidentigos jam eksteren per sia multnombro la grandegan evoluon de nia movado en la pasintaj jaroj; Germanujo garantias tian kongreson per sia propra multnombra Esperantistaro, same kiel bonega kaj facile atingebla vojaĝcelo por eksterlandaj samideanoj. La demando: ĉu Germanujo? estas jam preparollita en Praha; montrigis ĝojge, ke ankaŭ la iam malamikaj landoj principe tute ne malsimpatias la elekton de germanlanda urbo; sole la urbo Wiesbaden, situanta en okupita teritorio, ŝajnis tiam neoportuna. Nordgermanujo (ekz. Hamburg) estus ja oportuna por nordaj ŝtatoj, sed des pli maloportuna por sud-



ANTIKVA NÜRNBERG.

La bildo montras parton de la urbo trafua de l' rivero Pegnitz. Similaj aspektoj sin montras en diversaj lokoj kaj donas al ili ĉarman karakteron memorigante al la itala enmara urbo Venezia.

europanoj, eĉ por sudgermanoj, Mezgermanujo jam havis unufoje U. K. (Dresden 1908). Do restas, kiel kongreslando, nur Sudgermanujo, ĝuanta oportunan situacion kaj ĝeneralajn simpatiojn en-kaj eksterlande.

En Sudgermanio, daŭrigis la prezidantoj sian konvinkigan paroladon, estas vere taŭga urbo, nome Nürnberg, la favorkongresurbo de Germanujo. Tiu ĉi bonfama art-, komerc- kaj moderna grandurbo enhavas programon en si mem. Nürnberg estas gastama urbo, kiel unuanime konstatas ĉiuj fremduloj; ĝi estas ankaŭ bone atingebla kongresurbo kun bonaj hoteloj, kaj la multsperta porfremdula unuigo, loĝiginta jam multajn same eĉ pli grandajn kongresojn, lokigos ankaŭ modele la XV-an. Nürnberg havas idealajn kongresajn ejojn kaj salonegojn (Kulturunuiga Domo, Herkules-salonego, Urba Teatro, Urbarka Restoracio ktp.). Nürnberg, la mezepoka juvelujo de Germanio, allogas same la historiulon, la artamanton kaj la plezuremulon (kastelo, urbdomo, muzeo, teatroj, galerioj, preĝejoj, monumentoj, promenadejoj, Dutzend-lago, bestparko ktp.); Nürnberg prezentas maloftajn eblecojn por belaj najbaraj ekskursetoj ekz. en la Frankan Svisujon, al Rothenburg, Bamberg, Solenhofen; ĝi havas plie bonajn fervojajn rilatojn al la bavara sudo (München, Alpoj). En Nürnberg, la historia lulilo de la Esp. movado, vivadis antaŭ 35 jaroj niaj unuaj meritplenaj pioniroj, estigis la unua Esp. organizaĵo kaj la unua Esp. gazeto; ĝi estos inda stergejo por kvazaŭ jubilea kongreso.

Nürnberg nuntempe denove ludas gvidantan rolon en la movado, enhavante multnombrian bonorganizitan Esperantistaron, vastan Esp. instruadon en ĉiuradaj kaj ĉiustepaj lernejoj kaj eksterordinaran apogon flanke de estraroj, de urbkonsilantaro, gazetaro, Komerca Ĉambro, publiko. Nürnberg estas fine progresema kultejo por ĉiuj modernaj movadoj: Scienculoj, komercistoj, laboristoj, teozofoj, fra-masonoj, Frey-Liganoj, judoj, virinoj, blinduloj, sportuloj ktp. trovas samidealan hazon por staj fakunusidoj. Do resume: Nürnberg estas vere ideala sidejo por U. K., kaj estas tial nepre rekomendinda por la XV-a en 1923.

Varma aplaŭdo de la multnombra ĉeestantaro same kiel la posta vigla diskutado montris, ke ĉiuj nepre konsentis la trafajn nerefuteblajn argumentojn de la iniciatinto. Oni komisiis la estraron finesplori la projekton kaj prezenti kiel eble plej baldaŭ pozitivajn proponojn. Jam la 11-an de januaro 1922 ĉi tiu prezentiĝis detalan skizon pri starigo de L. K. K. kaj kongresprogramo, koncernantan ĉiujn cirkonstancojn. Zorge diskutinte kaj aprobinte la projekton, oni decidis ekpaŝi la oficialan vojon.

Interdume la unuaj sciigoj pri la Nürnberg-a projekto estis aperintaj en la gazetaro. Kelkio el la abonantaro de ET eble rememoras nian artikolon en n-o 79 „Kie ni kongresos en 1923?“, en kiu ni prezentis la unuan fojon la suprajn pensojn al la vasta publiko. Apude ni profituzis

ĉiun okazon por disvastigi nian intencon kaj propagandi ĝin ĉu skribe ĉu parole. Ideala okazo ŝajnis al ni speciale la Paska Instruista Konferenco en Geneve, al kiu ni delegis nian kartelestron D-ro Ledermann, por ke li laŭeble inter-esigu ĉiulandajn eminentulojn por nia afero. Sed reveninte, li bedaŭre devis konstati, ke niaj ŝancoj ne estas tre bonaj; ĉar diversaj influicaj personoj, pro taktikaj kaŭzoj, tute kontraŭstaris nian proponon, opiniante ke la U. K. ne okazu en Germanujo por eviti eĉ la ŝajnon, kvazaŭ Esperanto estas prefere germana afero, kio en la nunaj cirkonstancoj povus malutili nian movadon en certaj landoj. Ankaŭ la estraro de G. E. A., estanta sufiĉe pesimista pri nia propono, hezitis komence apogi nian inviton, opiniante ke estas aliaj pli rajtaj proponoj. La Nürnberg-a Esperantistaro, metante la prosperadon de la movado super ĉio, vole nevole ekrezignis sian favorprojekton, lasante la preferon al la itala samideanoj, kiuj ja ne havis ĝis nun UK-on. Sed ĉiuj penadoj aranĝi italan kongreson, ĉu en Roma ĉu en Milano aŭ Bologna, estis sensukcesaj, kaj niaj ŝancoj denove pli boniĝis. Tamen ni deklaris: ni ne altrudos nin, sed ni estos pretaj salii en la breĉon, se la Esperanta intereso postulos ĝin. Legante poste en la gazetoj pri alirbalaj invitoj (Hamburg, Vieno, Varsovio) ni tamen ne perdis la kaŝan-esperon ĉiam konvinkate, ke Nürnberg pro siaj multaj preferoj estus kaj restus la plej taŭga kongresurbo.

La Helsinki-a kongreso pli kaj pli alproksimiĝis kaj ni devis decidiĝi, ĉu sendi delegiton ĉu ne. Multaj gekartelanoj, kiuj jam intencis viziti la XIV-an, devis bedaŭre rezigni, ĉar la vojaĝkostoj nepre malebligis la vojaĝon. Aliflanke ŝajnis urĝe necese inviti la kongreson per speciala delegito. Fine nia oferema financestro s-ro Höhnigsberger deklaris sin preta vojaĝi por prezenti persone al la kongresanaro la oficialan inviton de la Nürnberg-aj Esperantistaro kaj urbkonsilantaro. Ĉar ankaŭ la lastnoma, delonge pruvinta sian Esperanto-emon per enkondukado de la mondhelpingvo en ĉiuradajn lernejojn, estis rajtiginta nian delegiton inviti la XV-an al Nürnberg.

Varsovio, nia ĉefkonkuranto, estis jam rezigninta dum la kongreso, kaj la plimulto el la kongresanoj vigle simpatiis pri la bavara metropolo. Tamen kelkij kontraŭstarantoj penadis ankoraŭ por eltrovi negermanan kongresurbon. Sed la dioj apogis Nürnbergon. Kiam okazis la decida kurso, nia delegito malfanfarone, sed kore kaj impresive prezentis Nürnbergon por 1923. Goje oni akklamis la proponon, kaj kiam eĉ D-ro Privat, nia kara ĉefkontraŭulo, forjetis nun ĉiujn siajn dubojn kaj pledis entuziasmege por la urbo de Sachs kaj Dürer tiam tondra aplaŭdo plenigis la salonegon kaj sankcitis la unuaniman voĉdonadon.

Mi ne bezonas priskribi la goĝegon, kiam alvenis la senpacience atendita telegramo pri la efektiva elekto de Nürnberg, aprobata interdume per multaj entuziasmaj leteroj de ĉiulandaj gemikoj. Multon oni atendas de ni. Nia zorgo estu pravigi iliajn atendojn!

PS. La artikolo, verkita de la plezurestro de la XV-a kaj destinita por la Nürnberg-a Numero, bedaŭre perdis ĝin dumvoje, pro kio ni ĉikune repreas ĝin.

## Universala Esperanto-Biblioteko.

De O. Rieck, Greifswald.

Antaŭ pli ol du mil jaroj en Aleksandrio (Egiptio) ekestis biblioteko, kiu fariĝis centro de la sciencoj. La donacemaj ptolomeaj regoj zorgis pri tio, ke sciencistoj el ĉiuj landoj venis Aleksandrion por studi tie je la kostoj de la egipta ŝtato, pilgrandigi la bibliotekon kaj instrui la disĉiplojn. Kiam en la jaro 47 antaŭ Kristo brulado detruis grandan parton (700000 volumojn)

ĵus kiam mi estis subtere en la malvasta, malhela ŝakto.

Kion signifas tio, mi pensis, espereble la lifto baldaŭ refunkcios. Senpacience mi atendis kelkajn minutojn, ĝi ne ekmoviĝis.

Ho, kion pensos mia edzino, miaj parencoj? Kiel trovi kredeblan senkulpiĝon pro mia foresto? Pro malpacienco mi saltetis de unu piedo sur la alian.

Ho, ke mi povu iamaniere eliri! Sed antaŭ mi la nevidebla muro, flanke kaj malantaŭe la vandoj de l' kajuto.

Mi intencis rigardi mian poŝhorloĝon — pro diablo! — en la malhelio mi povis distingii nenion.

Ĉu ĝi ankoraŭ ne estas ekmoviĝinta? De supre mi aŭdis — el malproksima distanco — la iradon de homoj; sed pli kaj la pli bruto de l' paŝoj malplilaŭtigis — nun fariĝis tute silente super mi. Sed jen... kun laŭta grincado fermiĝis pordego, mi aŭdis tinton de ŝlosiloj, kaj nun... ĉirkaŭ mi regis tomba silento.

Mi eklaŭtigis kriegon Ha, terura ekkono, Oni estis ferminta la oficejon kaj mi estis kaptita en malvasta, malhela kaĝo. Mi kriegis pro furiozo, mi piedbatis la plankon, mi skulis la vandojn, mi vundgratis miajn manojn provante suprenlevi la lifton, senutile. Ho, mi ne riskis pripensi la eventualon, eble devi pasigi la tutan nokton en la memelektiita malliberejo. Ne tolerbla imago! Mi turmentegis mian cerbon por trovi elvojon, mi duobligis miajn penadojn por suprenŝovi la lifton, mi blasfemis pro kolero, mi preĝis pro malespero. Ho, la malbeninda lifto! Ĉu ĝi ne povis pluveturi nur unu metron? Pro kio ĝi haltis ĝuste en la momento, kiam mi estis en la ŝakto? Tia impertinenteco! Tia senhonta maliceco! Mi apogiĝis mian kapon al la vando kaj ekploris, ploregis kaj fine mi senforte falis planken.

je la alia flanko elsaltis; kaj ne eĉ momenton la lifto haltis. Ho, estis tre interese, sinjoro; se vi foje havos okazon vidi ion similan, faru tion, sed nepre ne kunveturu, pro Dio ne!

„Ĉu ankaŭ mi faru provon?“ mi timemete meditis. Kompreneble! Kurage mi alpaŝis. Mi levis la kruron por ensalti... unu kajuto preterveturis, ... du... tri... ankoraŭ ne mi riskis. Mi returniĝis tri paŝojn por preni ekkuron.

„Ho, ho,“ vekriegis dika sinjoro malantaŭ mi, ĉar mi estis piedfrapinta iliajn piedfingrojn, tiel ke li insultante ĉirkaŭbalanciĝadis sur unu piedo, tenante la alian en la manoj.

„Kion vi jen faras, vi arlekeno,“ oni murmuris post mi, „eniru aŭ foriru.“

Duone ŝovpuŝite, duone per propra forta ek-salto mi ensaltis; mia nazv puŝiĝis kontraŭ la vando, miaj manoj serĉis tenilon, kiun ili ne trovis... kaj jam mi sidis sur certa korpoparto. Mi palpis mian korpon... feliĉe, ne vundita! Mi ekstaris. Ha, jam en la plej supra etaĝo? Ĉu mi eliru? Sed jam estis tro malfrue, ĉar la kajuto ĵus traveturis la subtegmenton kaj jen... ĝi malsupreniĝis. Ha, kia sento, kia goĝo post tiel longa malhavo! Jen la antaŭhalo! Nu, ĉar la veturado tra la subtegmento tiel bônorsorte sukcesis, mi kompreneble riskos la samon tra la ŝakto. Ha, kiel malhele subite fariĝis; tre proksime antaŭ mi ŝtona muro, eliri ne plu eble! La kajuto iomete skuigis, mi sentis, ke ĝi veturis iomete flanken kaj poste leviĝis supren. Tra la fendoj jam montrigis lumo kaj jen... la tago! Mi devas konfesi, ke mi iomete timis en la malhela truo. La afero pli kaj pli plaĉis al mi; mi restis, mi veturadis kaj veturadis. Kiam mi laŭ mia kalkulo eble la tridekan fojon malsupreniĝis, mi ekvidis en la antaŭhalo mian bofraton, kiu iomete kun zorgo ĉirkaŭrigardadis. Nun mi bedaŭrinde devis eliri.

Mi prenis ekkuron... kaj jen mi kuŝis ĝuste antaŭ la piedoj de mia bofrato.

„Nu, jen vi ja estas,“ li diris levante min, „mi jam maltrankviliĝis pri vi. Sed tiel intense vi ne bezonis esplori la aranĝojn, ŝajnas, ke la aparato tre interesis vin. Ĉu vi estas vundita?“

„Ne grave,“ mi respondis, frotante mian nezon, el kiu fluetis sango, „ĉion oni bezonas lerni.“

Ni daŭrigis nian promenadon. Malgraŭ mia vea nazo mi kelkfoje demandis:

„Ĉu vi ne forgesis ion, Karlo, ĉu vi ne havas aferon ordigitan en alia oficejo?“

Bedaŭrinde mi ne plu sukcesis.

Post la hejmvieno mi vane penis trovi motivon por forŝteliri. Nur je la malfrua posttagmezo ni ree faris promenadon kune kun niaj edzinoj. Mi sukcesis konduki ilin tra la koncerna strato, klun mi bone estis enmemoriginta al mi. Ĉe la oficejo mi ŝejnigis, kvazaŭ mi tre intense rigardus la elmetojn de apuda magezeno. Mi atendis, ĝis kiam mia kunularo estis iomete pluirinta. En oportuna momento mi per grandegaj saltoj enkurigis la oficejon, kie mi senhezite ensaltis en liftkajuton.

Nur kvin fojojn mi pensis. Sed el la kvin fojoj fariĝis dek. Ho, certe ne povus malutili — ankoraŭ kvin fojojn!

Ho, sinjoro, pro kio mi ne obeis la admonajn voĉojn en mia koro, pro kio mi cedis je la allogoj de mia pasio! Nun mi devis eksperti la danĝerecon, ruzecon kaj malicon de tia neprikalkulebla objekto.

La lasta vico finiĝis. Nur ankoraŭ unu fojon unu solan, sed nepre la lastan; post la eliro el la ŝakto mi tute certe eliros, mi intencis. Sed malsupreniĝante ĉi tiun lastan fojon la lifto pli kaj pli malrapidiĝis, kaj jen kun skuigo ĝi haltis

de la biblioteko, la romana triumviro Antonius parte kompencis la perdon donacante al la urbo Aleksandrio la pergamonan bibliotekon, kiu konsistis el 200000 volumoj. Tiamaniere de la jaro 300 antaŭ Kristo ĝis la jaro 500 post Kristo la Aleksandria Biblioteko superis ĉiujn aliajn bibliotekojn de la mondo kaj disvastigis lumon kaj benon.

Ekestas la demando, ĉu ne la Esperantistoj povas krei similan bibliotekon? Certe, jes, eĉ pli grandan, pli gravan kaj pli valoran. Sed la moderna universala Esperanto-Biblioteko diferencigos de la Aleksandria Biblioteko en multaj rilatoj. Antaŭ ĉio oni ne povas doni ŝtatajn salajrojn al ĉiulandaj sciencistoj, plue oni ne povas starigi centran konstruaĵon por la biblioteko. Sed ni povas skribi kaj kolekti ĉiusepacajn Esperanto-librojn. Tute ne estas necese, ke ĉiuj Esperantistoj estu presataj. Tio ankaŭ ne estas ebla. Oni ne trovus sufiĉe da eldonistoj kaj sufiĉe da libroaĉetantoj. La eldonistoj ĝenerale estas devigataj presigi nur tiajn librojn, kies vendo estas verŝajna. Tre ofte la plej gravaj verkoj trovas nek aĉetantojn nek legantojn. Antaŭ nelonge granda germana prunta biblioteko raportis, ke ĝi prunedonis la nove eldonitajn verkojn de la plej fama filozofo Kant dum la lastaj 12 jaroj eĉ ne unu fojon. Pro tio okazas, ke multaj valoraj manuskriptoj restas nekonataj en la skribotabloj de la seniluziitaj verkintoj.

Kion fari? Ni organizu la intelektan laboron inter la Esperantistoj, ni kolektu la jam ekzistantajn Esperanto-librojn kaj manuskriptojn, ni verku novajn Esperantajn kaj kreu kvazaŭ konstantan mondfojron por la intelektaj laboraĵoj en Esperanto. La ĉefaj organizaĵoj jam ekzistas. Internacia Scienca Asocio estu ĝenerala direktanto de la laboro. La fakaj organizaĵoj (kuracistoj, biologoj, geologoj, teknikistoj, poŝtistoj, fervojistoj, ŝipistoj, inĝenieroj ktp.) aliĝinte al Internacia Scienca Asocio starigu universalaĵajn fakajn bibliotekojn jenmaniere: La prezidantoj de la fakaj organizaĵoj kolektu la malnovajn kaj la novajn librojn kaj manuskriptojn, instigu la diversnaciajn membrojn al traduko de gravaj fakaj verkoj kaj de interesaj artikoloj el la fakaj gazetoj. Ili kolektu precipe la manuskriptojn, kiuj ne troviĝas eldonistojn. Antaŭ la envido de la libroj kaj manuskriptoj en la bibliotekon, komisio korektu la tradukon kaj elcerpu la rekomendindajn fakajn esprimojn por la fakaj gazetoj. Post tio la prezidantoj publikigu la titolojn de la presitaj kaj skribitaj Esperanto-libroj en „Internacia Scienca Revuo“ kaj en la fakaj gazetoj, samtempe sciligante ke la skribitaj libroj ekzistas po unu ekzemplero kaj povas esti pruntedonataj nur al membroj de „Internacia Scienca Asocio“. Tiamaniere sciencistoj kaj fakistoj estos devigataj studi Esperanton kaj pagante aliĝante pligrandigi la gravecon de „Internacia Scienca Asocio“. Nun kiam „Internacia Scienca Asocio“ havos dek milojn da anoj, la Esperanto-eldonistoj povos premi teknikajn Esperanto-librojn kaj plenumi la dezirojn de japana inĝeniero kaj de D-ro B. Migliorini en ET n-o 111 (Parolejo 137).

Sed jam nun Universala Esperanto-Biblioteko povas plenumi tre gravajn servojn. Precipe en la landoj kun malbona valuto la sciencistoj suferegas, kaj multaj el ili ne povas publikigi siajn verkojn pro plikarigo de la papero kaj malriĉigo de la libroaĉetantoj. La sciencistoj certe konsentos, ke oni — rezervante al ili la rajton de multobligo — traduku iliajn manuskriptojn Esperante kaj senpage faru por ili efektan reklamon, ĉar povos esti, ke atentigitaj eksterlandaj eldonistoj presos multajn manuskriptojn en tiu ajn nacia lingvo. Plue povos okazi, ke eldonistoj de fakliteraturaĵoj pro esploroj venos al la fakaj Esperanto-bibliotekoj, se tiuj ĉi disponos pri centoj de valoraj manuskriptoj. Ni ĉiam klopodu, ke facile vendeblaj Esperanto-

originalaĵoj estu tradukotaj nacilingven, kaj la naciaj Esperanto-asocioj subtenu tiajn klopodojn.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt-oficistoj (ILEPO) jam decidis iri la montritan vojon. Depost la 1-a de januaro 1923 ĝi tradukigos la du oficialajn bultenojn de la Germana Poŝtministeraro „Amtsblatt des Reichspostministeriums“ (Oficiala Bulteno de la Regna Poŝtministeraro) kaj „Postnachrichtenblatt“ (Informilo pri la Poŝto). Tradukoj de aliaj oficialaj bultenoj sekvos. Krom tio ILEPO kolektos la plej interesajn artikolojn el la poŝt-faka gazetaro en Esperanta traduko.

Ĉu la Universala Sliparo de la Esperanto-Libraro estu administrato de Internacia Scienca Asocio, de la Internacia Universitato en Bruxelles, de Universala Esperanto-Asocio aŭ de la Komitato por Internacia Organizo de la Sciencaj Laboraj ĉe la Ligo de Nacioj, pri tio decidu kompetentuloj, nome s-oj D-ro Nitobé, ĝeneralo Sebert kaj aliaj. Sed tio jam estas zorgo pli postea. La ĉefajo estas, ke izoluloj, grupoj, kursestroj ekvivu tradukaĵojn aŭ originalojn sur bona papero en la formato de la papero por skribmaŝinoj (22x28 1/2 centimetroj). Oni lasu sufiĉe larĝan marginon libera ĉe ĉiuj direktoj de la skribpapero por faciligi la laboron de la bindistoj. Ankaŭ estas rekomendinde surskribi la paperon nur unufanke por eventuala posta presado.

Jen vere serioza, vere praktika laboro por miloj da Esperantistoj! La afero estas tiel grava, ke mi farus proponon pri starigo de Universala Esperanto-Biblioteko al la XV-a Kongreso en Nürnberg, se multaj legantoj de ET aprobus miajn insiigojn. Ĝis nun ni perdis multajn anojn, ĉar ili ne sciis utiligi la akiritajn konojn. Certe ne ĉiu Esperanto-laboro povas havigi al ni mongaĵojn. Sed tio ankaŭ ne estas necese. Sufiĉe, ke per nia laboro la Esperanto-movado kaj fine la tuta homaro havos profitojn. Ni pripensu ke ankaŭ la verkintoj de la aleksandriaĵaj volumoj ne ricevis rekompencojn de eldonistoj, sed kontentigis pri tio semi por la eterneco.

### 3-a Rondira Cirkulero de TEHA.

Karaj samideanoj hebreaj ĉiulandaj!  
Ĉar la eldonado de presota organo estas nun ankoraŭ nebla por ni, la centra komitato de TEHA laŭ la deziro al ĝi esprimita de multo da membroj, decidis provizore eldonadi ĉiumonatan manuskribotan rondiran cirkuleron-organon kun enhavo speciale interesa por nia afero. Ĝia formato estos 20x16.

Kapablaj TEHA-anoj estas kore invitataj al kunlaboro. Samtempe ni sciligas, ke s-ano D-ro Eugeno Fuchs, advokato en Mátészalka (Hungar.) estas nomita ĉefdelegito por Hungarujo, kaj s-ano Kürschner Frigyes, Budapest (Hungar.), Haldurca 23/1, delegito por Budapest.

Fine, ni tre petas la TEHA-anojn, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizojn, kiom eble plej rapide sendi ĝin al

Izrael Lejzerowicz,  
prov. hon. sekr. de TEHA,  
Lodz (Pol.), Kilinskiego 28.

### Mallongaj Esp. Sciigoj.

Italujo.

En Genova la „Laborista Esp. Grupo“ havas senpagan sidejon en la tiea Labor-Borso. Kvan-kam la grupo laŭ sia statuto konservis sian politikan kaj religian neŭtralecon, ĝi tamen okaze de politika agitado ne povis kunveni dum kelkaj tagoj, estis vicle esplorita, kaj trovis poste sian sidejon malarangita. Felice oni konstatis nur malgravaĵajn rompiĝojn kaj mankon de dokumentoj kaj bibliotekoj. Pro tio laŭ decido de ĝenerala kunsido tuj kunvokita la grupo reproklamis sian neŭtralecon, renovigis sian dankesprimon

elfali; mi volis kriegi, sed mia lango estis sekiginta pro la netolerebla varmego. Poste mi ŝvitegante vekigis.

„Ho, kiel teruran sonĝon mi havis, Eŭlialo... ĉu vi aŭdis, Eŭlialo... ho, hiel profunde vi dormas!“ Mi palpis ĉirkaŭ mi por veki ŝin, sed mia mano trafis nur la malmolan lignon kaj la malvarman muron. Ho, kial do miaj ostoj tiel doloras? Mi ekŝiĝis. Kie mi do estas? Iom post iom mi rekonsciis pri mia plorinda situacio. Malesperante mi refalis. Ĉu ankoraŭ ne tagiĝis? Kioma homo eble estas? Kaj tiel malgraba sento en mia stomako! Ĉu mi ne havas ion por manĝi en miaj poŝoj?... Ho, bedaŭrinde ne! Ree mi lomete dormetis, kiel longe mi ne scias.

Fine mi ree vekigis per tielo de ŝlosiloj, simila al tiu de l' pasinta vespero.

„Oni venas, oni venas“, mi jubilis.

Se la tinto de l' ŝlosiloj je la vespero ŝajnis al mi kiel tomba sonorado, ĝi ĉi tiun fojon estis al mi kiel la sonorado de revivigaj paskaj sonoriloj. Neniam en mia vivo mi aŭdis pli dolĉajn sonojn ol ĉi tiun tinton de ŝlosiloj kaj la brugnecadon de l' malfermiganta pordego. Nun certe la lifto baldaŭ refunkcios.

Mi ne eraris. Jen mallaŭta zumado, eta skuligo, kaj jam la tago brilis el la proksimiganta antaŭhalo. Mi elsaltis, ne, elruliĝis, lasante miajn ĉapelon, kolumon, kravateton kaj ombrelon en la kajuto, Mi kuregis tra la miregantaj enirantaj ofi-cistoj, mi kuregis tra la stratoj, jam plenaj de homoj, al la hejmo de miaj parencoj.

Miaj boĝefratoj zorgeme penadis pri mi. Mia edzino... ho, ŝi etendis ŝiajn brakojn, ĉirkaŭprenis kaj kisis min kun ĝojlarmoj... vi supozas, ĉu ne?

Ne, sinjoro, vi eraras.

al la estraro de la Labor-Borso kaj denove komencis sian agadon por Esp.

En Torino la „Esp. Fervojista Unio“ depost 1. dec. havas sian sidejon kaj lernejon en la centra stacidomo de Torino PN, rajtigita de la „Kompartmento Direkcio Ferrovie Stato“ (eniro: Via: Sacchi 3). — „Torina Asocio por disvastiĝo de helpa lingvo Esp.“ malfermis novajn kursojn en la komunuma lernejo A. Pacchiotti en Via Bertola 8.

### Germanujo.

En Essen okazis 26. nov. en aparta salono de la loka ŝtata gimnazio antaŭ la Ekzamena Komitato por la rejnl.-vesif. industriregiono (adr. Essen, Kahrst. 47) de la Esp. Intitudo por la germ. respubliko la aŭtuna ekzameno „pri kapableco“. La plimulto el la kandidatoj devenantaj el la plej diversaj profesioj, lernis Esp. nur dum la lastaj 2 semestroj ĉe „Akademiaj Kursoj“. La direktoro de ĉi tiu oficiala instituto kaj kelkaj filologoj ĉeestis la ekzamendon. Sukcese pasis la ekzamenon ĉiuj 13 sin enskribintaj sinjoroj. Dum la buŝa ekzameno la kandidatoj respondis la Esp. faritajn demandojn per la sama lingvo ĝuste, flue kaj kun bonega elparolado.

En Dresden la SAT-grupo malfermis dum oktobro 18 kursojn kun pli ol 600 ĝeartoprenintoj.

En Koblenz la loka grupo propagandas inter la katolika junularo. Kurso gvidata de s-o Funken.

En Riesa ĉe Elbe la loka grupo propagandas en la vilaĝa ĉirkaŭajo. En Nünchritz ekzistas subgrupo. Propaganda parolado de s-o Sohrmann, kurso de s-o Wiesemann. En Bobers-Riesa nova kurso de s-o Kröber precipe por laboristoj. En Saarbrücken (Saarteritorio) nova kurso por komencantoj de s-oj Krämer kaj D-ro Besse-nich. Perfektiga kurso de s-o Schenkel el Friedrichstal.

En Friedrichstal propaganda parolado de s-o Schenkel kaj nova kurso.

En Karlsruhe 26. nov. kunvenis la badenaj samideanoj. Delegitoj reprezentis la grupojn de Baden-Baden, Durlach, Freiburg, Friedrichsfeld, Karlsruhe, Mannheim, Mannheim-Neckarau kaj Waldshut. Oni decidis starigi „Badenan. Esp. Laborunuiĝon“. Laŭ raportoj en teritorio Baden loĝas ĉirkaŭ 500 Esp. grupanoj. En tuta Baden oni starigis en vintra semestro 1922/23 por komencantoj 15 kursojn. Oni intencas konkondi en tuta Badenlando la lernolibron de Borel resp. Irmscher.

Nova entrepreno sub la kontrolo de SAT.

Sennacleca Asocio Tutmonda (SAT) estas kreanta propran libroeldonejon. Ĝi estas starigata sub la nomo „Tutmonda Koopera Eldonejo“ kaj funkcias kiel kooperativo eldonante akciojn por havigo de la bezonata kapitalo. Anŝi povas al la kooperativo ĉiu persono aŭ entrepreno, kiu enpagas la akcian sumon akcitan je 500 gmk. po akcio (provizore). Pri la elektotaj verkoj decidis literatura komisiono formata de la Centra Komitato la SAT, voĉdonos pri la decidoj de l' eldoneja komitato la anoj dum la III-a SAT-kongreso okazonta en Cassel (Germ.). Interesatoj turnu sin al la administaro de „Tutmonda Koopera Eldonejo“: s-o H. Remers, Düsseldorf, Louisenstr. 97, Germ., kiu akceptas monsumojn por akcioj kaj antaŭmendajn pagojn por libroj aperontaj.

### Hungara Esperanto Instituto.

Budapest VI., Eötvös u. 3. oficialaj horoj: lunde pm. 5—8. Biblioteko, librovendado, eldonejo. — Prezidanto: D-ro Béla Récz de Kövesd, subprezidanto: D-ro Vincze Toth, ĉefsekretario: Julio Baghy, kasisto: Imre Roboz, Fakoj: Propagando, Statistiko, Instruo, Literaturo, Gazetservo. Fak-estroj: D-ro Kalocsai, D-ro Lóránd, D-ro Takács, Stefano Kéthelyi, Paulo Balkányi.

### Kongresanoj por la XV-a.

57. Kötz Irene, f-ino, Leipzig.
58. Kötz Gertrud, s-ino, Leipzig.
59. Kötz Bernhard, Leipzig.
60. Buseth S., Leipzig.
61. D-ro Trügel Robert, Auerbach i/V.
62. Müller Richard, Auerbach i/V.
63. Müller Wartuhi, s-ino, Auerbach i/V.
64. D-ro Theilhaber Robert, München.
65. Theilhaber Mimi, s-ino, München.
66. Wilbert Anton, Köln-Deutz.
67. Hiller Karl, Bamberg.
68. Müller Marta, f-ino, Auerbach i/V.
69. Sevenhuijsen Nelly, f-ino, Haarlem.
70. Kluge Charlotte Wally, f-ino, Falkenstein i/V.
71. Tittmann Joseph, Bamberg.
72. Reber Otto, Bamberg.
73. Hess Fritz, Bamberg.
74. Weiss Karl, Bamberg.
75. Hess Rosel, f-ino, Bamberg.
76. Christ Maya, f-ino, Bamberg.
77. Möllenberg Heinrich, Bremen.
78. Bernhard Johann, München.
79. Bauer Friedrich, München.
80. Wollter-Plüster Signe, s-ino, Nürnberg.
81. Patzschke Georg, FÜRTH i/B.
82. D-ro Seeburger Alfred, Bayreuth.
83. Fricke Wilhelm, Bremen.
84. Ziegler Gustav, München.
85. Allez Joseph, f-ino, München.
86. Habelok Erich, Breslau.
87. Habelok Gerhard, Breslau.
88. Bünemann Oscar, Hamburg.
89. Bünemann Elisabeth, s-ino, Hamburg.
90. Barh Karl, Auerbach i/V.
91. Sealthelm Albert, Auerbach i/V.
92. D-ro Kühn Victor, Auerbach i/V.
93. Jungk Helene, Ellefeld/Auerbach.
94. Hornung Johanna, f-ino, Auerbach i/V.
95. Schneider Hilde, f-ino, Auerbach i/V.
96. Göschel Grete, f-ino, Auerbach i/V.
97. Lehmann Gretel, f-ino, Auerbach i/V.
- 98.—137. Seminaristoj, Auerbach i/V.
138. Kalitzky Karl, Eisenach.
139. Meagher James Antony, Baile 'Aha Cliath.
140. Gawanika Gottlieb, Hamburg.
141. Leitt Karl, Otting (Post Waging).
142. Mc Kinnell Annie f-ino, Glasgow.
143. Dougall Jessie, f-ino, Kirkintilloch.
144. Dougall Annie, f-ino, Kirkintilloch.
145. Vogel Josef, Salzburg.
146. Böning Hans, Stuttgart.
147. Böning Ottilie, s-ino, Stuttgart.
148. Barkhausen Heinrich, Bremen.
149. Keller Hans, Bremen.
150. Halbedl Adolf, Graz.
151. Halbedl Maria, f-ino, Graz.
152. Strauch August, Bottrop.
153. Balkányi Pál, Budapest.
154. Kéthelyi Stefano, Budapest.
155. Kéthelyi Wolcota Margit, s-ino, Budapest.
156. D-ro Tóth Vince, Budapest.
157. Tóth, s-ino, Budapest.
158. Gieswein Aleksandro, Budapest.
159. D-ro Kozma Karlo, Budapest.
160. Kozma Nora, s-ino, Budapest.
161. D-ro Loránd Leo, Budapest.
162. Szász Béla, Budapest.
163. Roboz laivau, Budapest.
164. Lederer Dora, f-ino, Budapest.
165. Lederer Margit, f-ino, Budapest.
166. Zimmermann Zdislo, Budapest.
167. Pechan Alfonz, Pécs.
168. D-ro Mybs Eduard.
169. Mybs Elia, s-ino.
170. D-ro Kasper Ludwig, Eiblawald/Stelerm.
171. Schade Franz, Wien.
172. Macferlane Agnes G, f-ino, Partick-Glasgow.
173. Rudnicki Stanislaw, Trzebinia.
174. Mrazková Anezka, f-ino, Chranów.
175. Janečka Paula, s-ino, Chranów.
176. Janečka Dagmar, f-ino, Chranów.
177. Janečka Jaroslao, Chranów.
178. Janečka Oldrich, Chranów.
179. John Walter, Frelat P.
180. Heilmüller Heino, Bremen.
181. Freund Siegmund, Breslau.
182. Freund, s-ino, Breslau.
183. Elizondo Teodoro, Bilbao.
184. Del Campo Ricardo, Bilbao.
185. Muthschall Ernst, Forst/Lausitz.
186. Dittmann Anny, f-ino, Bamberg.
187. Ziegler Udo, Ansbach.
188. Jalava Leo, Helsinki.
189. Jalava Elli, s-ino, Helsinki.
190. Rieck Otto, Grefswald/Pommern.

(Daŭrigota).

### Kiune jam aliĝis, aliĝu tuj!

liftojn, precipe la aŭtomatajn; rigardu ilin nur de tre malproksime, sed pro tio ne veturu per aliaj, alie vi eble elportos la samon kiel via

malfeliĉa amiko

Kristiano Mallerta

### Leterkesto de ET.

J. R. en St. Pulkele, alojas postkantorl. — Via abono daŭras nun ĝis 146.

J. Spr. en Romarno. — Sendita sumo egales iom pli ol 14 kr. ĉ., por kiuj ni liveros al vi ET de 115—124.

A. L. en Bari. — Sendita sumo bone alvenis.

Prof. J. G. en Saaz. — Post sendita mk. 5000.— via abono daŭras ĝis 120. Sciigu nin, kiu numero ne alvenis ĉe vi.

V. E. en Praha. — Se vi estas abonanto de ET, kial vi ne legis la kondiĉojn por anoncoj en la gazeto? Ili estas: antaŭpago kaj enpresio en du sinsekvaj numeroj.

G. S. en Warszawa, kaj multaj aliaj. — Ni ne povas respondi al ĉiu abonanto pri la daŭro de la abono. Se vi antaŭ kelkaj tagoj ricevis karton ke la abono finiĝis por 98 vi facile povas kalkuli, ke post sendo de 3000 pmk. ĝi nun daŭras ĝis 128.

E. J. en Letovice. — Poŝtmarkojn ni estonte ne povas akcepti, ĉar ni ne scias kiel uzli ilin. La mankintaĵo estas elcerpita. Kiam ni ricevos ilin ni sendos ilin al vi.

F. D. en Warszawa. — Komprenete ni plenumas nian promeson kaj enskribas por vi 3 pliajn numerojn ĝis 121.

W. K. en Radom. — Pri poŝtkalendaro bonvolu turni vin al Butin & Jung en Godesberg a. Rh. (Germ.) Supoze via amiko F. nun regule ricevas ET.

J. K. en Luck. — Via aŭstrala korespondantino sendu al ni anglajn ŝilingojn laŭ tarifoj en titolo de ET. Ni sendis al ŝi apcilon.

### Bonaj ŝancoj por la XV-a.

La unua milo da kongresanoj kompleta!

## La uragano.

La atmosfero estas varme peza kaj seke sufokada la gorĝojn de tiuj homparioj, duonnudaj kaj ĉifonvestitaj, kiuj, kvazaŭ malvive, kuŝas tie sur la ombra deklivo de senherba monteto. En la unua momento oni eĉ ne povas distingi ilin de la bestoj. La korpoj malpural, kovritaj de abomeninde teruraj vundoj kaj kotoj, malbonodore haladzas. La infekta spirajo ŝvebas, kvazaŭ videble super ili, kaj naŭzige premas la brustojn. Malfeliĉaj pestuloj!

En vasta rondo, malproksime de ili, alta plektobarilo, etendas sin tiom funebre, ke eĉ la fremdulo konjektas eternosongan tombejon post ĝi. Antaŭ la pordego, mizere kaduka staras du armitaj gardistoj. Ili muteindiferente rigardas al la malproksima urbo, luksa kaj ŝaŭme vivanta, kies konturoj akre vidiĝas en la blindige brilantaj sunradioj. Silento regas ĉion.

Subite io murmuris tra la varmega aero. Nuboj kolegrizaj aperas minace ĉe la horizonto. Pala flava koloro superverŝas ĉion. La suno ruĝe diafanan vualon tiras antaŭ sian vizaĝon. Pro silka kareso de leviganta venteto tremadas zumbante la foliaro de l' proksima arbaro.

„Pluvegos!“ diras la unua gardisto. La alia nur senvorte kapjesas.

Nigrigaj nubomontroj etendas sin sur la arko de la firmamento. Kiel egaj kadavroj, vestitaj per fantaziaj kostumoj. Tra la duonlumo ekbrilas fulmo, akompanata de murmuranta tondro...

„La unua fulmotondro en tiu ĉi jaro.“ diras la unua gardisto. La alia silente nur kapjesas. Interne de la plektobarilo iu malforta virina voĉo per lasta spiro ekĝemas:

„Jezuo, prenu mien... animon!“ kaj ŝiaj okuloj fikse direktiĝas al ĉielo.

Ekpluvas. En la komenco falas teren pezaj akvopeltoj. Poste pli kaj pli dense pluvas. La atmosfero iĝas pli pura pli malpeza. La vento ekskuas la foliaro de la arbaro, jam velkintan pro la longdaŭra sekeco... le fulmobatas. Pro la krakego surdiga ektermas la tero. La vento ventegigas. La pluvo, kvazaŭ nevideblaj manoj verŝus akvon el barelo, torente fluas ĉe kaj ĉien... Proksime falas fulmofajro. Post ĝi longaj flamlangoj kolekoruĝe suprenjetas sin al la griza ĉielo.

„La fulmo bruligis la farmon de Volodin“, diras duonlaŭte la unua gardisto kaj timeme faras krucosignon. La alia rigardas rekte al la flamoj kaj liaj lipoj kurbliĝas je moka ironia rideto.

„Kial vi ne faras krucosignon?“

„Vi ja scias mi estas mohametano.“

„Faru krucosignon! Ĝi gardos vin kontraŭ la malbono.“

„He! Superstiĉo!“

„Faru krucosignon aŭ almenaŭ iru pli malproksimen de mi!“

„Kial?“

„Ĉar Dio vidas ĉion kaj li, vidante vian senkredecon, fulmobatos vin iru pli malproksimen!“

„Tiu ĉi loko estas mia posteno... Vi timas la morton.“

„Mi timas nur Dion. Faru do krucosignon.“

„Strange! Oni pensas pri Dio sole en danĝero. Via pieco estas mortotimo.“

„Senkredu! Iru pli malproksimen de mi!“

La mahometana gardisto vidante la timotremon de sia kamarado, kiu kun streĉitaj okuloj rigardas lin, por kvietigi lin maltrankvilecon, faras la krucosignon. La alia ŝajne trankebligas, sed ĉe ĉiu fulmofajro li faras en rapida sinsekvo la kristanan ceremonion. Liaj lipoj, senĉese moviĝantaj, murmuris preĝon.

Interne de la plektobarilo aŭdiĝas doloraj plendĝemoj. La malfeliĉuloj pene trenas sin pli proksimen unu al alia. Voĉo sonas tra la fulmotondro:

„Vjuha! Vjuha!“

Nenia respondo. La longe etendita ĝemo flugas for per la ventoflugiloj.

„Vjuha! Vjuha!“ sonas plende pli dolore la vokokrio.

Iu ekmoviĝas en la mizera amaso kaj rampe proksimiĝas al la direkto, de kie la voĉo sonas simile al sanga ĝemo. Proksimume dekokjara knabino. Iam ŝi eble estis beleto, sed nun la malsano apenaŭ permesas supozi homan estaĵon en tiu vivanta skeleto.

„Vjuha! Vjuha!“ sonas la voko preskaŭ febre ploranta.

„Ĉu vi vokas, min Omar?! Ĉu vi suferas turmente?“

„Jam ne. Mi ne povas plu suferi, mi nur volis vidi vin ankoraŭ unufoje. Baldaŭ mi disiĝos.“

„Kaj vi ekvidos la ĉielan paradizon de l' profeto.“

„Mi ne renkontos vin plu, Vjuha!“

„Neniam, Omar!“

„Donu vian maneton!“ kaj li etendas sian manon al ŝi por preni la malgrasiĝintan, lam neblankan maneton. Ĝi milde ŝoviĝas en la manon de l' viro kaj la premado jen konvulsie tordigas, jen senforte ŝajnas morti. „Kiel varma estas via maneto... kiel varmega... Kisu min... kisu min lastfoje Vjuha...!“

Nun la ventego uragane ekblekas. La fulmofajroj zigzage sekvas unu la alian. Gigantaj polvofuneloj nigre leviĝas el la tero, kaj la pluvo venkonta ilin, kiel superakvego detruonta la mondon, torente fluas el la nigrigaj nubofontoj. Tondras. Tremas la aero. Skue movas sin la tero. La ventego ĝemas, veadas inter la kronoj de la

arboj, kvazaŭ mil kaj mil akuŝigantaj virinoj kriaĉus sen helpo. La pecoj de la plektobarilo, aŭsiritaj de la ventego, krozras en la aero kiel monstrbirdoj super la malfeliĉuloj. Ĉirkaŭe ruĝe fajrerigas la horizonto kaj la ventega blovo pelas antaŭ si iun malesperan haoson de voĉoj furiaj.

En tiu ĉi haoso glaciĝanta la animojn levigas, kiel vivanta venĝo pro miljaraj turmentoj, altkreska viro. Lia ĉifona vesto apenaŭ kovras la nudecon de la skeleta staturo. Ambaŭ manojn levante al la koleranta ĉielo li kriadas kun tremiga voĉo:

„Mi estas la vivanta pesto, sendita en la mondon, por purigi ĝin!“

Li ekiras per longaj trankvilaj paŝoj al la pordego, frakasita de la ventego. Kun liaj hirtaj haroj ludas sovaĝe la uragano. La bukloj, flirtantaj en la aero, impresas, kvazaŭ katenitaj viperoj volus mordi ĝis morto la kroze vagantaj foliojn. Preterpasinte la gardistojn li kriveadas kun cerbon skuanta ridego:

„Ve! Ve! Milfoje ve al vi, mondo de fieruloj... lukse vivantaj senkreduloj. Mi estas la uragano de l' vivo, kiu portas kun si la venenan spirajon de l' morto! Ve! Milfoje ve al vi!“

„He! Kien?“ eksonas nun la haltiga demando de la mahometana gardisto.

La vivanta skeleto kun rikama mieno turnas sin por momento. Straba lumo de la frenezo ekbrilas larme en liaj okuloj kaj pli laŭtigante sian voĉon kvazaŭ kantante iun monotonan melodion li parolas plue al la furiozantaj elementoj.

„Bruu vaga vento! Skuu la putrantajn branĉojn! Naskiĝis la filo de la Venĝodio. Hahaha! Bruu vaga vento. Skuu la putrantajn branĉojn! Falos la rikolto! Bela rikolto! Vivo de l' homaro... Hahaha!“

„Haltu!“ plengorge ekkrias la gardisto, levante la pafilon al la ŝultro.

En tiu momento blindiga fulmofajro kun ĉion skuanta ektondro falas inter la gardistoj kaj la frenezulo. La gardisto, tenanta la pafilon, ekŝanceliĝas kaj ŝajnas sveni por momento. La alia terenjetas sin kaj per ploreganta krio preĝas malespere. Interne de la plektobarilo eksonas kvazaŭ nevidebla ĥoro de mortĝemoj, la plorado de la pestuloj. La frenezulo kuregante paŝas al la urbo, kaj sonas kaj sonas senĉese lia voĉo.

„Mi estas sendita por fari juston inter fieruloj kaj modestuloj. Mi estas la vivanta pesto, detruonta la palacojn de la senkreduloj. Hahaha! Mi venis umi astan... on“

La frazon jam portas for nekomprenebla la ventego bruanta.

La mahometana gardisto kun larĝe streĉitaj pupiloj, plenplena de teruro, rigardas al la forpasanta pestulo. Subite, konsciante pri sia devo, li levas la pafilon kaj ekiras la ĉanon... La kuglo maltrafas. Li denove ripetas la pafon, sed pro la tremanta necerteco de siaj manoj denove perdas la celon... Rideksplodon de la frenezulo alportas responde la vento.

„Rabia! hundo! Ci devas morti! Ci ci, rabia rabia hun—“

En tiu momento liajn brakojn iu forte ĉirkaŭprenas. Li turnas sin por liberiĝi el la konvulsie tordiganta premo kaj vidas antaŭ si la vizaĝon de sia kamarado. Ĝi mienas plena de freneza fanatikeco.

„Ne! Ne! Ne mortigu lin! Li estas sendito de la Dio! Ne mortigu lin! Ne mortigu lin!“ li petegas rauke por ekscitiĝo.

Nun la vento alportas malproksiman krimon: „Mi estas la vivanta pesto...“

Plenforta luktado komenciĝas inter la du gardistoj. La muskoloj streĉiĝas, la spirado pli kaj pli similas al stierorado kaj iom post iom la peteganto fariĝas furioza atakanto. Tio estas jam batalo sole por vivo aŭ morto kaj el la malproksimeco ankoraŭ sonas senĉese la kantanta voĉo de la frenezulo:

„Mi estas la vivanta pesto por fari juston...“

La vento ankoraŭ fajfante siblas inter la senfoliigitaj branĉoj de la arbaro, sed ĉe la horizonto jam aperas la milda bluo de la firmamento. La radioj de la suno pere trarompos la larĝe etendigitan nubovualon, lumigante per mistika fantoma duonhelo la detruitajn pejzaĝon.

Subite korpremiga silento... La ruĝa disko ĉiela ekaperas en larĝa fendo de la nuboj kaj jetas siajn radiojn al du senmovaj figuroj. La sidanta figuro kun retenita peza spiro, kun sangokovritaj okuloj rigardas timoplene la vitriĝantajn okulojn de la venkito.

La sunbrilo, kiel ironia rideto de la kapricema naturo, desegnas monstrajn ombrojn sur la sabla tero.

Julio Baghy.

## Inter kaptitoj.

„Kial vi ploras samsortan? Ĉu vin turmentas la malsan?“  
„Ne! La ekstera vintra frost sin trapenetris ĝis la osi! Pro la glacia spir-nebul' larmas silente la okul'“

„Strange! La fajro de la forn' varme nin lulas nun al dorm!“  
„Pravas Vil Penson pri mizer' portas mi larme kun sufer', ĉar hejme vokas min infan', eble malsana nun, sen pan'“

Julio Baghy.

## Souchna.

De Oskar Schönberg.

Du tombomontetoj altiĝas el la flava sablo. Kaj el inter la kampaj sulkoj, proksime al la arbaro, ĝojkantante suprenflugas alaŭdo.

La unuaj grizaj ombroj falas mole sur la preskaŭ disfalintajn tombomontetojn, kiujn ornamas nek florkrono, nek kruco.

Trankvila estas la loko, tiel trankvila, kvazaŭ neniam tie estus pulsinta vivo — kvazaŭ neniam iu homa okulo estus ensorbinta la florantan belecon el la satiga brilego de l' naturo.

Kelkfoje nur devojiĝas iu migranto al tiu loko. Kaj la brilo de liaj surprizon vidigantaj rigardoj ornamas la profundan solecon per nova realeco. Tiam ankaŭ okazas, ke la animoj tie ripozantaj aŭdiĝas mallaŭtajn kantojn kaj super la tomboj sentiĝas kvazaŭ tremo, kiu rakontas al la aŭskultanta migranto pri pasintaj tempoj.

En la proksima betularbetaĵo io plendas kaj admonas — ekĝenuu! Kiuj ĉi tie ripozas, estas benataj de Dio kaj troviĝas en Lia paco.

Ciutage tra la tomba soleco pasas malhelaj sonoj de vokantaj sonoriloj. De tempo al tempo la vento blovas super la montetoj, kvazaŭ volante ion forviŝi — kaj ju pli longe kaj pli forte la sonoriloj vokas, des pli furioze la vento bruas.

Kaj la animoj de l' mortintoj ĝemas. Kaj ili plendas pro senrajtigo kaj honto!

Fantomumas! En la vilaĝo jam delonge ili tion rakontas sekrete. Kaj ili ne aliras la lokon, aŭ timeme faras tri krucosignon, kiam tamen foje la okazo ilin devigas preterpasi.

Estis efektive stranga okazaĵo. Kaj eĉ nuntempe neniu scias, kiu estis kulpa.

Ili venis kun la printempo. Gaje, vigle, kiel la elsudaj plumhavaj kantistoj, la birdoj. Sub la brilo de l' ora printempa suno jam delonge estis degelintaj la lastaj neĝeroj; kaj sur la foira placo staris la disŝirita kaj malpura tendo de la fremduloj. Estis multimiksita homaro, ĉiam malsata kaj ĉiam trudemata.

Sed ili estis ne danĝeraj.

Kaj la vilaĝa junularo admiris ilin.

Migranta popolo! — Ciganoj! — Efektivaj ciganoj!

Brunaj, fortaj, duonnudaj! Iliaj malhelaj okuloj timigis la infanojn, sed iliaj petolaj serĉoj ridigis ilin. La tuta vilaĝo, redita de la eterna sameco, ĝoja pro la foririnta vintro, toleris ilin volonte.

La ciganoj scipovis danci!

Haj! — Haj! —

Kaj la junuloj sentis siajn korojn tremantaj. Sed al Jano la ĉeflaboristo en la bieno »Ruĝa Ĉevalo«, tre plaĉis la gracia, nigra Souchna. Li donis al ŝi monon kaj manĝon, kaj ŝi dancis, dancis, ĝis la purpura suno ekmortis en la lasta flama kiso.

Sed vespere ŝi kisis lin.

Ŝia koro estis lin elektinta, ĉar li estis forta kaj lia ĉirkaŭpremo ŝin doloris. Kaj ŝi konfidis lin.

Sekrete, kiam la gastejo apud la foira placo estis bruena kaj la ciganoj muzikis por dancado, la okuloj de Souchna serĉis la amaton. Ŝia koro ne atentis je l' dancado; ŝia koro estis ĉe Jano, kaj ŝia animo kantis al la lia sovaĝajn, fajrajn amkantojn.

Tiam Souchna ne povis plu resti en la gastejo. Ekstere ŝi montris al la ĉeflaboristo sian tutan koron — kaj li ridis — kaj trinkis ŝian korsangon — trinkis ĝin — kaj trinkis.

Kaj Souchna trovis la feliĉon. Ŝi trovis ĝin ĉe l' vojo — kiel ĉiuj ŝiaj kunfratinoj.

De tago al tago la suno rampis pli supren, kaj la semajnoj pasis.

La ciganoj estis forveturontaj.

Souchna sidis antaŭ la tendo kaj revis. Rigide ŝi rigardis al la bieno »Ruĝa Ĉevalo«. Ŝi atendis Janon. Kaj jam longe ŝi atendis.

Tagojn? — Semajnojn? —

Kion Souchna sciis pri la tempo. Ŝi nombris la vivon nur laŭ la horoj de l' feliĉo.

Kaj ŝi atendis. Ŝi ankoraŭ atendis, kiam jam la veturiloj forportis ŝiajn kunfratinojn kaj kunfratinojn. Sed vespere ŝi staris antaŭ Jano. Ŝi petis. Ŝi flate premis sian junan korpon al liaj genuoj — kaj li ridis! Sed jen ŝi koleriĝis. Ŝi minacis. Kaj Jano batis la brunan, molan knabinkorpon.

La amo de Souchna mortis ĉe la unua bato, kaj malamo naskiĝis en ŝia animo.

Ŝi foriris — malrapide — kaj nombris la batojn, kiujn Jano donis por ŝia amo.

Sed ŝiajn paŝojn lumigis la helegaj flamoj, kiujn — kvazaŭ terura moko — ŝi estis jetinta en la bienon »Ruĝa Ĉevalo«.

La ombroj de l' nokto akceptis ŝin. El la malhelo ŝi fikse rigardis tien kaj senkore ridis pri la ludo de l' krakanta fajro.

Ŝi serĉis la animon de Jano en la flamoj — — Kiam nenio plu estis savebla, la kampistoj forkuregis por trovi la ciganojn. La mortintoj postulis revenon.

Souchna kaŝis rapide la malvivan koron de Jano en la ŝian kaj foriris.

Nur ŝia amo superflugas la fulmantan, varmegan ruinaĵon. —

La ciganoj rapide estis trovataj. En la proksima vilaĝo ili petole amuzis sin, nenion antaŭsentante, kaj senzorgaj pri la hodiaŭo aŭ morgaŭo. Krude oni puŝis ilin antaŭen. Oni batis ilin.

Souchna ne estis inter ili.

Souchna estis migrinta en la vastan mondon. Al ŝi la kunesto kun la gefratoj ne estis alportinta feliĉon. Ŝi serĉis kaj serĉis ion kaj povis ĝin trovi, kion ŝi serĉis. Sed nun ŝia animo doloris pro sopiro. Kaj la noktoj lacigis ŝian korpon.

Tiel pasis la tempo! — El la migranta hom-areto multaj sin savis, forkuris — — jen ĉi tien, jen tien — sen celo — sen trankvilo!

Nur la gepatroj de Souchna estis restintaj. Kaj ilin ambaŭ oni kondukis el la kaptitejo al la morto. La homoj prenis ilian vivon, la homoj, kiuj ne fidis al ili.

Nun la vento blovas somere super iliaj tomboj kaj de temp' al tempo iu birdo kantas al ilia dormo. Sed ili kuŝas rigidaj — mutaj. — Neniu scias ilian mizeron.

Sed kiam la vento tro forte plendas kaj ĝemas en la folioj de l' betularbetaĵo, la vilaĝanoj diras: fantomumas ĉe l' tombomontetoj. Kaj ili faras krucosignojn, kaj dum la nokto sendormigas ilin la timo. —

Somero post somero pasas. La vento forblovis la postsignojn de Souchna. Nur malofte oni rememoras pri la veraj okazaĵoj. Timemo kaj superstiĉo regas inter la vilaĝanoj. —

Ree printempo. Alvenis la vilaĝon maljuna, sulkiginta virneto. De bieno al bieno, de domo al domo ŝi iris almozpetante donacojn kaj modestan dormlokon. Sed antaŭ la bieno »Ruĝa Ĉevalo« ŝi longe staris, kaj malame brilis ŝiaj okuloj.

Ŝi eligis nekompreneblajn sonojn — jen plendantaj, jen tremantaj pro malamo. Sed la vilaĝanoj miris pri ŝi kaj mokis.

La maljunulo forlamis. Kaj ĉe la tomboj multajn tagojn ŝi sidis kaj kantis fremdlandajn kantojn por pleni la animojn de l' mortintoj per milda paco.

Souchna estis trovinta la hejmvojon. Ŝi reportis la malvivan koron de Jano. Kaj ŝi serĉis hejmon por sia animo.

Iun tagon oni trovis ŝin.

Jen kuŝis Souchna sur la ornamitaj montetoj, mole, inter freŝaj floroj, kaj la unua varma matena sunradio kisis ŝiajn paligintajn lipojn. Mallaŭta, dolĉa bioveto forportis kun ŝi ŝiajn lastajn plendokantojn — malproksimen — malproksimen, for al pli bela lando.

Tradukis el la germana lingvo Kvarfoliano.

## El Kalevido.

Kanto I, 1—17.

*Remu bardo, per la buŝo, remu nur la ruĝosipon, de la bardo la boaton, — remu ĝin al tiu bordo. Kien agloj orajn vortojn, — korvoj kantojn el argento, cigno kuprajn rakontetojn, pri la antikveco ŝutis, pri la praepok' disjetis. Vi scigu, birdoj sagaj, vi sonigu, ondoj akvaj, vi aŭdigu, ventoj karaj: kie la lulilo de Kalevoj kie la lando de l' foruloj, kie la hejmo de l' herooj? Kantu, bordo, kantu ĉiam, kial volas vi silenti?*

Tradukis: Henriko Seppik.

Rimarko de l' tradukinto: „Kalevido“ („Kalereipevĝ“) estas la estona nacia epopeo, kompilita de D-ro Fr. R. Kreutzwald inter la jaroj 1850 kaj 1862. Tiu ĉi grandverko de ĉirkaŭ 20000 versoj, (20 kantoj) havas por estonoj kiel nacio egan gravecon.

## El „Skizoj el la antikva Bulgarujo“

De Nikolaj Rajnov.

La frosto kovris la Balkanmontarojn kaj je la junaj pinbranĉetoj pendis pezaj brilantaj floroj. — Kaj blanke kovritaj, la arboj songis sian neĝan fabelon.

Kaj la batalantoj marŝadis. Super ili pendis vasta blanka ĉielo; je la lavangokovritaj ŝtonrokoj rampis blankaj nebuloj; kaj la turnovento flugis sovaĝe de supro al supro, por purigi la vojon de l' batalantoj.

... Kaj tie en la neĝaj sinoj de supraj Balkanmontaroj ili trovis sian malvarman tombon. Kaj ili falis, — rigidaj kaj palej — falis unu apud alia. Kaj super ili vastiĝis la blanka frosta ĉielo — kiel pura mortvesto, kiel argenta tegmento, kiel blanka surtomba kanto...

Kaj la hometoj de malsupre — la homoj en la valoj de l' vivo — kun sensaĝaj flametoj en siaj timemaj okuloj demandis unu la alian mallaŭte kaj senkuraĝe:

„Kial ili mortis?...“

— — — — —  
Kaj poste venis nokto — peza nokto, plena je turmento kaj malĝojo, nokto tlminda — kaj kiam la hometoj en la valoj ekdormis kaŝite en sia malgranda feliĉo, la ventego malsupreniris de la suproj, sternis sur la dormantoj sian sangan rubandon — kaj murmuretis minacake:

„Ili mortis — por vi!“

El la Bulg. lingvo trad. Mil.

## Penseroj.

*Sondante fundon mia de animo, Mi eble perdas iom da estimo; Sed en komparo ĉiu dubo falas: Certege min almenaŭ vi egalas!*  
*Por kio vi penas, sopire batalas, Ĉu atingitaĵon ĝi iam egalas? Kredu, ke ĉiu dezir' atingita Estas por vi ideal' estingita!*

\* \* \*  
*Pacienco estas la virto de la malbonaj konsciencoj.*

Kiuza.